

## Kiel Giorgio Silfer intervjue raportas pri la instaligo de Literatura Foiro en Svislando

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-839/321, 1979 novembro 08 kaj 10

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-48->

[/Radioprelego\\_839\\_SRI\\_321\\_1979\\_11\\_08\\_10\\_Kiel\\_Giorgio\\_Silfer\\_intervjue\\_raportas\\_pri\\_la\\_instaligo\\_de\\_Literatura\\_Foiro\\_en\\_Svislando.mp3](http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-48-)

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia sinjoro Claude Gacond.

Mi hodiaŭ intervjuas unu el miaj kunlaborantoj, s-ron Giorgio Silfer, redaktoro de Literatura Foiro. Sinjoro Giorgio Silfer, kiel vi karakterizu la jaron, kiun vi nun pli malpli travivis en Svislando ?

GS.- Kiel karakterizi ĉi tiun unuan jaron? Ekzemple ĝi estis jaro de granda kresko, el kvanta vidpunkto.

Cl.- Do, el la nombro de la abonantaro?

GS.- El la nombro de la abonantaro, sed ankaŭ el la nombro de la produkto, kiun ni liveris al niaj abonantoj. Ekzemple ekzistis pasintjare - kaj ekzistas ankaŭ ĉi-jare - ses unuopaj numeroj, dum en antaŭaj jaroj ni havis kvin el kiuj unu duobla. Dum la lastaj jaroj en Finnlando la gazeto estis 16-paĝa, pasintjare ĝi estis 20-paĝa kaj ĉi-jare ĝi estas ni diru 22-paĝa meznombro, venontjare 24-paĝa, do estas konstanta kresko en tiu kultura servo, kvante kaj ankaŭ kvalite.

Cl.- Jes, ĉar kelkaj numeroj de Literatura Foiro estis eksterordinare interesaj kaj unuecaj, ĉu ne, dum tiu ĉi jaro.

GS.- Jes, mi volas almenaŭ mencii tiun pri Volapük, okaze de la centa datreveno de tiu mortinta projekto, kiu tamen estas tre grava por kompreni ankaŭ kielojn kaj kialojn de Esperanto.

Cl.- Kaj ĉu tiu numero pri Volapük estis ebla ĉefe ĉar Literatura Foiro instaligis en La Chaux-de-Fonds?

GS.- Kompreneble, al tio donis grandan kontribuon la apudeco de CDELI. Tiu Centro estas la plej grava en la mondo rilate al la bibliografio en Volapük.

Cl.- Se mi ne eraras, do, apud la centra redakcejo en La Chaux-de-Fonds estas du aŭ tri aliaj redakcejoj. Estas sufiĉe kompleksa organizo. Ĉu vi povas klarigi kiel nun funkcias tiu organizo, Literatura Foiro ?

GS.- Nuntempe ekzistas tri sidejoj, el kiuj la ĉefa estas en Svislando, kiel mi jam diris, kaj la du filioj, unu en Milano, alia en Helsinko. La celo estas decentralizi la laboron kaj tion oni jam parte atingis. Mi povus eĉ diri ke oni plene atingis ĝin ĉar ĝi ne povas ekzisti, almenaŭ se ne estus kunlaboro en la promociado fare de la du filioj, kaj ankaŭ la preso kaj la ekspedo dependas esence de nia mediteranea filio en Milano. Por tio ni havas la helpon de konstantaj funkciuloj, kiuj senpage ofertas sian tempon. Ili estas nomataj ĉe ni 'stabanoj', ili havas nenian

rekompencon alian ol partopreni en tiu kolektivo, kiu kreas Literaturan Foiiron. Fakte Literatura Foiro estas la rezulto de kolektiva laboro. Estus tro granda flato kredi, ke ĝi estas la rezulto nur aŭ unuavice de la laboro de la ĉefredaktoro.

Cl.- Jes, ĝi estas la forto de Literatura Foiro, tiu kolektiva laboro. Kaj nun, Literatura Foiro estas konata en esperantio ĉefe, ni diru, apud la revuo, pro la konkurso de la 'Verko de la jaro'. Ĉu vi povas doni al ni sciigojn pri la rezulto ĉi-jara?

GS.- Jes, sed se vi permesas, mi volas korekti vin: la 'Verko de la jaro' ne estas konkurso, ĝi estas 'premio'. Almenaŭ mi komprenas, ke en konkurso homoj aŭ libroj kandidatiĝas, dum ĉe ni neniu kandidatiĝas per si mem. Estas necese simple, ke la notario, d-ro Tazio Carlevaro vidu en kelkaj titoloj la necesajn teknikajn detalojn kaj post tio ili estas aŭtomate kandidatoj. Ili eventuale povas rezigni je la premio, do la tuto funkcias praktike same kiel la Nobel-premio. La rezulto dependas de la voĉdono de la referendumo fare de a abonantoj de Literatura Foiro. Ĉi-jare tiu referendumo asignis la premion al la libro de John Francis, La granda kaldrono, kiu estas la plej ampleksa romano ĝis nun aperinta en esperanto.

Cl.- Literatura Foiro havas abonantaron en multaj landoj. Kiel viciĝas tiuj ĉi landoj, kio montras eble pli aŭ malpli da koniĝo kun LF?

GS.- Tio estas alia interesa punkto ligita ankaŭ al la transloĝiĝo. Ni diru ke dum la finna periodo la ĉefa merkato estis la Sovetunia, sekvis laŭvice la itala kaj trie la finna. Dum ĉi-jare la plej grava merkato estas la svisa kun ĉirkaŭ 400 pagitaj abonoj. Sekvas la Sovetunia kio do fariĝis la dua, kaj la tria estas la itala, la kvara estas la pola kaj kvina en la vico estas Finnlando, sed praktike ĝi estas en la sama rango kun aliaj gravaj okcidenteŭropaj landoj kiel ekzemple Francio kaj Germanio.

Cl.- Kiel disvolviĝas via informado, via reklamado por Literatura Foiro ?

GS.- Mi devas diri ke la reklamado de Literatura Foiro unuavice okazas pere de la revuo mem. Nome, ni kredas, ke la plej bona reklamo de varo estas la kvalito de la varo mem. Kaj praktike venas al ni rekte la homoj, kiel okazis ĉi-jare pro la unua kolektiva abono en Svislando. Ni planas baldaŭ negoci duan kolektivan abonon, kiu portus kroman centon da abonantoj, ĉiam en Svislando. Kaj ĝenerale tio okazas kun rekta ligo kun la merkataj interesoj. Nome, la fakto ke ni havas ampleksan legantaron en Italio, influas je tio, ke oni trovas certan mediteranean sintenon en la enhavo de LF. Sed ankaŭ la fakto, ke ni havas tiom fortan baltan merkaton, influas al la balteco de Literatura Foiro. Mi devas diri ke ĝenerale LF estas malfermita al ĉiuj kulturaj tendencoj, sed la evoluo de la revuo estas divenebla ankaŭ kadre de la landoj elektitaj por sidejo de novaj filioj, nome Svedio kaj eventuale Aŭstrio. Do ni fariĝas revuo ĉiam pli ligita al neŭtralaj landoj, revuo kiu intencas kulture servi do ĉiun socian ordon, ĉiun socian sistemon, en kiu do ni estas aktive neŭtralaj, kaj mi kredas, ke ni donas grandan kontribuon por la konsciiĝo pri la unueco de la eŭropa kulturo.

Cl.- Ĉu sidejo en Svislando helpas vin en tiu neŭtrala sinteno?

GS.- Jes, kaj speciale la fakto ke la sidejo estas en Romandio, parto de Svislando, kiu havas grandan tradicion rilate al internaciaj kontaktoj, al laboro por paco, por mondfederalismo kaj simile. Ne hazarde ĝuste la institucio kiu provizas pere de la taŭgaj lokaloj la diversajn

establojn de La Chaux-de-Fonds estas titolita la nomo de Edmond Privat, unu el la plej grandaj aktivaj laboregantoj por la monda paco kaj la monda federalismo.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond intervjuis s-ron Giorgio Silfer, ĉefredaktoro de Literatura Foiro kaj kursestro de Internacia FERIA Altlernejo en La Chaux-de-Fonds. Ĝis reaŭdo!

---

*Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013*